Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Julio-Aŭgusto *2003*

ISSN 1163.0442

MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

74-a jaro, n-roj 7-8 (1177/78)

5 €

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

FINIĜIS TRE SUKCESE LA 76-A SAT-KONGRESO EN ĈAŬDEFONO



Dum la solena malfermo kiun prezidis k-dino Perla Martinelli, de maldekstre sidas: Barkoviĉ, Schram, Martinelli, Berthet, Zelazny.

Foto: «foto L'Impartial/L'Express»

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj,
post reveno el la SAT-kongreso mi finas tiun ĉi duoblan numeron de via Sennaciulo. En ĝi vi trovos nur la ĉijarajn Deklaracion kaj Gvidrezolucion. Sekve, la septembra numero estos dediĉita al la detalaj informoj pri la tre sukcesa 76-a SAT-kongreso kaj en la oktobra vi povos legi kompletan protokolon pri niaj kongresaj laboroj. Tiun ĉi numeron via redaktoro finas kun postkongresa impreso ke SAT faras kaj faros bonan laboron; ke ĝi estas nepre necesa kaj utila progresema, neneŭtrala E-Asocio. Mi esperas ke la legado de niaj venontaj numeroj instigos vin pli aktive partopreni en la agado de SAT kaj partopreni en la venontjara SAT-kongreso kiu okazos en aŭgusto 2004 en Bratislava (Slovakio). Do bonan someron al ĉiuj,
via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


NOVA PERANTO EN BRAZILO

Post la tragika forpaso de nia kamarado Gilbert LEDON la perantecon por Brazilo transprenis nia k-do

José Joaquin LUNAZZI
Rua Manoel Antunes Novo, 668
BR-13084-157 CAMPINAS-SP
Brazilo
rete: <lunazzi@uol.com.br>

KAMARADO MAX HOLLINGER 80-JARA

Nia kamarado Max HOLLINGER, konata de tre multaj el niaj membroj, fariĝis en junio 80-jara. Ni elkore gratulas al nia kamarado kaj deziras al li sanon kaj feliĉon.




K-do Hollinger perfekte organizis SAT-kongresojn en Linco, en 1955, 1983 kaj 1990; kunlaboras en Sennaciulo (ofte kadre de Liberpensula frakcio) kaj kreis plurajn bonegajn SAT-anojn inter kiuj la plej konata estas nia litovia perantino. Ankaŭ li ebligis al pluraj SAT-anoj el nepagipovaj landoj partopreni al SAT-kongresoj. Dankon kara Max, kaj nur daŭrigu.

La Redaktoro

S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !



Nova PIV aperis !
Akiru ĝin ĉe SAT.
Prezo:70 € + afranko
Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €
ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Printempo 2003: Kial denove nun francoj strikas kaj manifestacias?

La nuna franca reakcia registaro amasigas la klasbatalajn konfliktojn, kiuj tial iel konfuziĝas, precipe por la kategorioj de salajruloj, kiujn ili kune frapas. La tri ĉefaj por la nuna momento estas la problemo de la emeritaj pensioj, la tiel nomata malcentrigo, kiu celas dependigi la regionojn pli rekte de Bruselo anstataŭ Parizo kaj la projekto privatigi ĉiujn publikajn servojn kaj redukti la rolon de la ŝtato al la subpremaj, kurioze en respubliko tiel nomataj «regaliennes» («reĝecaj») misioj: polico,



juĝaparato, punsistemo, armeo.

Pri la emeritaj pensioj, la projekto, kiun la registaro decidis trudi estas, resume: kreskigi la salajrulajn kotizojn, plilongigi la devigan daŭron de kotizado, plialtigi la minimuman aĝon de emeritiĝo kaj redukti la emeritajn pensiojn. Unuvorte: la salajruloj devos pagi pli multe kaj dum pli longa tempo por pli malfrue ricevi reduktitan pension. La preteksto de tiu katastrofa socia malprogreso estas statistike konstatita plilongiĝo de la vivo. Tiu statistika ĝeneralaĵo kovras konsideran malegalecon inter sociaj klasoj kaj profesiaj kategorioj.

La financa problemo estas reala, ĉar la rilato elspezoj/enspezoj de la pensiaj kasoj ne ĉesas kreski. La demografia preteksto tamen estas mensoga.

En la kvara plej riĉa lando de la mondo, la sola demografio ne estas la ĉefa faktoro de la situacio. Se la junaj laborpretaj aktivuloj estus pli multaj, ili nur ŝveligus la nombron de la senlaboruloj kaj malstabilaj dungitoj, kiuj jam estas pli ol tri milionoj, reprezentante pli ol 12 % el la aktivularo kaj tiel ili nur pligravigus la deficitojn de la sociprotektaj kasoj. Se la mastraro kaj ĝiaj politikaj reprezentantoj mem tion kredus, kion ili diras, ili ne tiel malice fitraktus la laborantajn virinojn, kiel ili faris kaj plu faras jam de multaj generacioj. La reakcia projekto fakte ankoraŭ pli draste frapas la virinojn ol la ceterajn salajrulojn. La proporcio de junaj virinoj, kiuj mortas dum akuŝo, lastatempe kreskas.

La vera kaŭzo de la reala problemo estas la drasta redukto de la salajra maso, alivorte de la varia kapitalo, dum la profitoj de la grandaj privataj monopoloj flugas supren per duciferaj jaraj kvotoj kaj la reala produktado stagnas pro manko de pagipovaj klientoj. Ĝi rezultas de konscia celado, obstine aplikata, por «redukti la prezon de la laboro». La francaj ministroj kaj reprezentantoj de la mastraro, inter kiuj troviĝas reprezentantoj de oficiala politika maldekstro, ne timas esprimi publike tiun ekstremreakcie klasbatalan celadon, kies vera signifo estas: «redukto de la prezo de la laborforto». La motivo de tiu celado estas la kapitalisma strebado kontraŭ la tendenca malkresko de la meza profitkvoto, kiu rezultas de la kresko de la kapitalo fronte al ĉiam pli malvasta merkato. Ĝi estas klarvorte enskribita en la teksto mem de la Traktato de Romo-Mastriĥto, laŭ kiu la Eŭropa Centra Banko en Frankfurto ricevis interalie la mision severe observi la evoluon de la salajroj, kaj kiun la Eŭropa Komisiono en Bruselo fervore aplikigas. Ĝi ankaŭ estas konstanta rekomendo de la reakcie klasbatalaj tutmondaj organizoj: IMF, Monda Banko, MOK, G7+1, ktp ...

G7 estas neformala kunveno, sen jura ekzisto, de la registarestroj de la sep plej riĉaj landoj. Al ĝi aliĝis Rusio post la disfaligo de Sovetio. Ĝin iniciatis, dum li estis prezidanto de la Franca Respubliko, Giscard d'Estaing, nuna prezidanto de la Komisiono, kiu preparas la Konstitucion de Eŭropa Unuiĝo.

Ĉar la kaŭzo de la problemo estas la manko de kotizoj bazitaj nur sur la salajra maso, do sur la «prezo de la labor(fort)o», la reakcia solvo, kiu konsistas en plia redukto de la salajra maso, ne riskas vere solvi la problemon sed nur povos senfine pligravigi ĝin. Tiom pli, ke la nuna registaro, kiel la antaŭaj, malavare faras senĉesajn donacojn al la kapitalo per deprenoj el la sociprotektaj kasoj, financataj per salajrulaj kotizoj. Ĝi elvokas la bildojn de hundo turniĝanta por mordi sian voston kaj de azeno, kiu sufokas sin tirante sur sia ŝnuro por liberiĝi.



Ĉar la nuna aŭ antaŭvidita deficito de la sociprotektaj kasoj fakte spegulas la deficiton de la salajra maso, la plej natura solvo estus konvena kaj konforma reĝustigo kaj plibonigo de la salajroj, kiuj ja estas skandale tro malaltaj.

Notinde, la problemo neniel estas france-franca kaj neniel estas, kontraŭe al tio, kion la franca dekstrularo provas kredigi, konflikto inter salajruloj de la privata sektoro kaj tiuj de la ŝtato. La problemo prezentiĝas kun la sama klasbatala fundo kaj kun la sama mensoga demografia preteksto en aliaj eŭropaj landoj: Aŭstrio, Germanio, Hispanio ... Dume, konsciaj usonanoj povas prave kun envio konsideri la eŭropajn sistemojn de socia protekto. Tial la rezultoj de bataloj okazantaj en unu lando gravas ankaŭ por aliaj.

Dum la eŭropa mastraro kaj ĝiaj politikaj reprezentantoj provas dividi kaj interkonkurencigi la eŭropajn kaj neeŭropajn salajrulojn, ĉi ties konkreta solidareco pli kaj pli estas evidenta. Ankoraŭ malfruas ĝia konsciiĝo. Kontribui al ĉi ties akcelo estas unu el la statutaj taskoj de SAT.

Ankaŭ interese estus, precipe por junaj, novaj kaj neokcidenteŭropaj SAT-anoj, analizi la ruze hipokritajn procedojn uzatajn de klasbatale burĝaj specialistoj en la ideologia milito kontraŭ la strikantojn.

Petro Levi (23.111)

G8 - PROTESTOJ

Radikala agado

La socialista partio de Francio (PS) starigis dum la G8 forumon kontraŭ la G8. Estis invitita, inter aliaj uloj, eksa membro de la monda internacia fonduso (MIF/FMI). La PS partoprenis 14-foje en la G8, per F. Mitterand (eksprezidento). Tiu partio respondecas pri la konstruado de la G8. Poste kiel ĉefministro, L. Jospin blokis trajnon de manifestantoj kiu devus alveni al Ĝenovo en 2001. Malgraŭ tio la PS trovis tutnormale esti nun kontraŭ la tutmondiĝo... Aliaj uloj ne same pensis.

Oni reage alvokis por kontraŭmanifestacii. Estis almenaŭ 1000 uloj. Ni havis afiŝon, flagojn, sloganojn: "PS = kunlaboranto"; "PS pensas ke ni stultas"; "PS kulpas pri ŝteloj en Afriko" ktp...Survoje oni salutis la popolon de Annemasse kiu rigardis tra siaj fenestroj.

Multe da anarkiistoj de la VAAAG, kaj ankaŭ kelkaj komunistoj alvenis al pordo de la konferencejo. Ruboj estis ĵetitaj al enirejo. Jam sekureculoj komencis nervoziĝi. Ili estis almenaŭ sep. Post perfortaj diskutoj kun la kelkaj PS-anoj kiuj restis ekstere, manifestantoj decidis malpermesi la renkontiĝon. Ili decidis fermi la lokon per tabuloj kaj aliaj aĵoj. Tiu afero daŭris dum kelkaj minutoj. Kiam oni ebligis al la lastaj sekureculoj eniri la lokon, okazis konflikto.

"Gaso, gaso!!" La PS-sekurecanoj estis malplenigantaj siajn piprajn gasbombojn sur la manifestantojn. Ni ĉiuj komencis kuradi. Kelkaj homoj suferis de la glua likvaĵo. Oni disdonis okulgutojn kaj akvon. Post tio, manifestantoj pli agresemaj revenis al la loko. Post ĵetoj de ŝtonoj pluraj grandegaj vitroj falis surteren. Aliaj manifestantoj grimpis sur la tegmenton. La policistoj tuj alvenis,



almenaŭ 300 videblaj. Por malebligi areston, ni grupiĝis. Rapide okazis la unua gaspafado far policistoj. Estis alia speco de gaso. 'La incita gaso'pli akceptebla ol la antaŭa, sed disĵetita al ĉiuj ĉi-foje. La nombro de policanoj ebligis nin reiri al la sama vojo. Tie ni estis marŝantaj en malriĉa kvartalo. Tuj la urbanoj aldonis botelojn de akvo kaj citronojn. La citrono utilis por malsekigi niajn koltukojn kaj pli bone spiradi en la gaso. Ni tuj grupe provis forfuĝi de la amaso de policistoj, sed rapide ni ekkomprenis, ke la polico sekvas nin. Ili verŝajne timis ke ni daŭrigu la detruadon. Dum la reveno al la kampo la urbanoj de Annemasse estis ankoraŭ ĉe siaj fenestroj, sed ĉi-foje ni mansignis al ili. La policistoj uzis pli kaj pli da gasoj kontraŭ ni. La enfalilo estis kuri, sed feliĉe ni grupe restis ĝis la fino. Ne sen interna problemo –kun tiuj kiuj ankoraŭ volis ataki la policon.

Finfine ni rave aŭdis per Vaaag-radio ke la PS nuligis sian forumon. Poste la PS faris plurajn deklarojn pri tiuj nedemokratiaj atakoj. Verŝajne la PS tute perdis sian kredindecon ĉe la maldekstrularo.

Cyr. [Pri la enhavo respondecas nur la aŭtoro]


Memadministrado en kontraŭkapitalisma vilaĝo

La ĉefa specifeco de la kontraŭkapitalisma vilaĝo VAAAG estas, ke en ĝia sino la utopio de kolektiva vivo sen estro estis travivita de ĉiuj dum unu semajno.




SAT-flago ornamis la tendon de niaj gejunuloj

Tio estas la memmastrumada funkciado, kiu jam estas kutimaĵo ene de la Senlimaj Kampoj (No Border Camps), tiuj tendumadoj organizataj de internacia movado kiu luktas por abolo de la landlimoj. La skemo de la kampo estas jena: la tendoj estas grupigitaj ĉirkaŭ kuirejoj tiel, ke en la mateno ĉiuj estu vekitaj de la matenmanĝa bruo. Post la matenmanĝo okazas po unu asembleo de kvartalo por ĉiu kuirejo. Tiam du moderatoroj, unu ino kaj unu malino, notas la personojn kiuj volas paroli, sciante ke alproksimiĝante la finon de la kunsido tiuj, kiuj ne ankoraŭ sin esprimis, havas prioritaton. En la kunsido ni traktas diversajn temojn rilate la ĉiutagan



vivon de la kvartalo, kiel la starigon de skipoj por prepari la diversajn manĝojn, por purigi la kampon kaj akcepti la novulojn. Tiu kadro ankaŭ oportunas por proponi ideojn, kiel inviti la loĝantojn de la apuda urbo por interŝanĝi opiniojn pri la kontraŭ G8 movado. Poste ni elektas du novajn gereprezentantojn por la tuj venonta interkvartala kunsido, kiu estas teknika kunsido kie oni traktas la punktojn postulantajn kunordigon de la 8 kvartaloj. Ekzemple povas temi pri la loko kie ni arigu la perditajn objektojn aŭ pri la disdonado de la enlistigitaj volontuloj al la diversaj akceptejoj.



Bertrand en la vilaĝo

Baldaŭ alvenas la tagmanĝo, kaj poste ni povas partopreni en interesaj debatoj, kies temoj estas buntaj: franca politiko en Afriko, aktuala movado de la strikoj kontraŭ privatigo de la publikaj servoj, manipulado de la amaskomunikiloj far grandaj firmaoj, Esperanto kiel solvo por demokratiigo de la lingva pejzaĝo, kaj multaj aliaj. Por tiuj, kiuj preferas la konkretan kontestadon, eblis en la posttagmezo aŭ eĉ de la mateno sin envolvi en iun surstratan agon kiel manifestacio kaj tial rekvizicii trajnon por eviti tro longan piediron, ĉar la manifestacioj foje okazis en Ĝenevo.

Kaj en la vespero la noktemuloj povis ĝui koncertojn el buntaj stiloj: punko, regee, roko, elektronika muziko, kaj aliaj stiloj ŝatataj de la junuloj.

Kaj jen ĉio. Kvankam la plimulto de la vilaĝanoj sciis kvazaŭ nenion pri anarkiismo, neniam mankis volontuloj por plenumi la ĉiutagajn taskojn, kaj ne estis ĉiam la samaj kiuj plukis la surgrundajn rubojn. Kaj eĉ la prefekto de la departemento vizitinte la vilaĝon miris pri ĝia bona organizado.

Sed la plej nediskutebla pruvo de sukceso kuŝis ĉefe en la memoroj de la VAAAG-anoj, kiuj jam sopiras la bonan etoson dum tiu sperto…

Bertrand Hugon

DEKLARO DE LA 13-a DE JUNIO 2003 - EL JAPANIO

Estis maljuste ke Usono atakis Irakon. Ni, la aŭtoroj de la «Deklaro de la 11a de septembro 2002», staras unuiĝinte kun civitanoj Japanaj kaj de la Mondo kontraŭ ĉi-tiu agreso. Armiloj de amasodetruo, la preteksto uzita de Usono por ĝustigi la unuflankan atakon al Irako, ankoraŭ ne estas trovitaj. En la postrikolto de la sangoverŝo kaj detruoj kaŭzitaj de l'atako, por rekonstrui la landon, estas necese alporti «paco»n kaj «demokratio»n al Irako --- la tempo de «batalobotoj» estas jam pasinta. Ni deklaras nian firman opozicion kontraŭ «Nova Leĝprojekto de Rekonstruo de Irako» proponita de la Japana registaro, kiu rezultus ekspedon de la Defendkorpusoj (= Japana armeo kontraŭ Konstitucio).

Estas klara por ĉiu ke l'agado de ĉi-tia speco estas komplete neĝustigebla kaj absolute abomeninda. Haltigu l'ekspedon de la trupoj. Pistu la leĝprojekton. Ni sendas ĉi-tiun «Deklaro»n al Japanio kaj la tuta Mondo. 13/junio/2003


Se vi aprobas kaj subtenas ĝin, bonvolu sendi vian subtenon al la jena retadreso tuj kiam eble: jitugen@y-salon.com

ODA Makoto, Director, Association for the Realization of Japan as a Conscious Objector Nation, Yamamura Salon, 4-1-301, Funado-cho, Ashiya-shi, Japan, 659-0093, FAX +81-797-38-5252,
http://www.y-salon.com/jitugennokai_001.htm
Kansai Citizen's Opinion 30
http://www.jca.apc.org/~shimin30/

Tradukita de Tetu Makino kaj korektita de Tahira Masako

Klasbatalo - kontraŭ ĉia naciismo

Nova prezidanto de la Internaciista Komunista Esperantista Kolektivo, Stan Keable (Britio), resumas la 14-an IKEK-konferencon, okazintan en majo 2003 en Bankja, Bulgario



Per sia ĉefrezolucio, la konferenco defendas la koncepton de internacia klasbatalo, kiel la malo de ĉia naciismo - «kio kondukas la laboristaron je la flanko de sia samnacia ekspluatanto, kontraŭ la laboristaro de ĉiuj aliaj nacioj». Tiu sinteno havos aktualan signifon je la julia kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kiam la laboristaj esperantistoj debatos, ne la unuan fojon, proponon forviŝi klasbatalon de siaj celoj. Mi vokas al komunistoj aliĝi al SAT, ĉeesti ties kongreson, partopreni tiun kaj aliajn debatojn kaj helpi ĝin trovi vojon al efika kontribuo al la klasbatalo.

Nia dua konferenca rezolucio «Dimitrov kaj esperanto» agnoskis la pozitivan rilaton al esperanto de Georgi Dimitrov, kiu bremsis en Bulgario la Stalinajn malpermesojn kaj persekutojn de Esperanto. Miaj gepatroj - Bill kaj Gladys Keable, aktivuloj de la antaŭulo de IKEK dum la tridekaj jaroj, la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE) - ĝis la morto kredis, ke tiaj malpermesoj kaj persekutoj neniam okazis en Bulgario. Sed nova eseo bulgarlingva de K-do Dimitar Papazov pri la rilato inter Dimitrov kaj Esperanto - «Inter la apologio kaj la neado» - pri kio li prelegis al ni, malkovris la malpermeson de Esperanto dum la kvindekaj jaroj, ĝuste ekde la morto de K-do Dimitrov. Trafe, la lasta eldonaĵo antaŭ la malpermeso estis biografio de Dimitrov mem, far k-dino Stella Blagoev - filino de la fama Dimitar Blagoev, la unua socialisto en Bulgario. Do, unu frapo vundis kaj Esperanton kaj la socialismon.

Nia Dimitrova rezolucio instigas nin labori «en la amasaj organizaĵoj». Komunistoj ne tenu sin aparte, sekteme pura, sed plene partoprenu, ekzemple, la sindikatojn, la kontraŭkapitalisman movadon, la sociajn forumojn. Ankaŭ la esperanto-movadon ni plene partoprenu, strebante defendi, kreskigi, evoluigi kaj demokratigi la diversajn organizaĵojn, farante ilin pli efikaj. Bedaŭrinde la konferenco ne detale pritraktis konkretajn aktualajn demandojn pri la konflikto en la Universala

Esperanto-Asocio, pri la streboj fari pli efikan SAT-on aŭ pri la meritoj de la pli nova Esperanta Civito, sed laŭ mia sinteno, komunistoj laboru pozitive en ĉiuj. La rezo-




Grupo de partoprenantoj

lucio difinas taskon «ligi la komunistajn ideojn kun la esperanto-movado» kaj labori «por la maldekstriĝo de la esperanto-movado, ligante ĝin kun la komunismaj ideoj



kaj la batalo por socia kaj lingva egalrajteco».

La konferenco, dum nur tri tagoj por diskutado, forpuŝinte turismajn aferojn, ne malŝparis multe da tempo diskutante organizajn taskojn. Ankaŭ la temaron pri la esperanto-movado ni ne prioritatis. Pli saĝe, ni komencis malferman diskutadon pri komunismaj demandoj. Preparitaj prelegoj pri «Kuba revolucio» (K-dino Mayra Nunez) kaj «Komunisma movado en Bulgario» (K-do Dimitar Haĝiev) donis elirpunktojn por interŝanĝoj pri la karaktero de Sovetunio kaj pri ĝia disfalo, pri burokrata aŭ demokrata centrismo, pri la malpermeso de diverstendencaj frakcioj en la bolŝevika partio ekde 1920, pri la karaktero de la Kuba revolucio - ĉu socialisma, se la socialismo povos realiĝi nur mondskale - pri la skismemo en la komunisma movado (oni parolis pri 14 komunistaj





partioj en Bulgario), kaj pri la streboj al komunista-socialista unueco en Bulgario, ankaŭ en Britio - kaj esperebIe en Eŭropo - pere de la Socialista Alianco. Tiujn kaj multajn aliajn temojn ni daŭre diskutos en la kolumnoj de nia gazeto, Internaciisto. Per la malferma diskutado ni strebos klarigi, kio estas la praktika komunisma programo, kaj la praktikaj taskoj de ni komunistaj esperantistoj.

Stan Keable

La venontjara 77-a SAT-kongreso

okazos en

BRATISLAVA (Slovakio)

2004-08-14/21

Postkongreso en

PRAGO kaj BOHEMIA KARSTO

2004-08-21/28

Ni agu por malarmado

Mi ŝatis en maja Sennaciulo la artikolon de Jakvo, kies titolo estas "Timu, uzantoj de nukleaj armiloj !", sed tie ĉi mi volas paroli pri la konkludo. Jakvo skribis :

« Humanistoj pledas por nuligo de mortopuno. Oni klopodas forigi kontraŭpersonajn minojn, oni klopodas malpermesi kemiajn kaj bakteriologiajn armilojn. Kiu malfermos la diskuton malpermesi amasbombadon, bombadi senkulpajn civitanojn?


Kial ne pledi por malpermeso de ĉiuj armeoj, kiuj krom altaj kostoj zorgas nur pri mizero ».



Eble necesas diskuti, sed precipe necesas agi.
Por celi malpermeson de ĉiuj armeoj, estas du eblecoj: ĉu oni atendas ke ĉiuj landoj de la tero samtempe forigas siajn armeojn kaj detruas siajn armilojn, ĉu unu lando komencas kaj unuflanke decidas forigi sian armeon kaj detrui siajn armilojn. En 1993, kvin socialistaj francaj gesenatanoj metis ĉe la oficejo de la Senato leĝproponon, kies titolo estas "Propono de leĝo pri unuflanka malarmigo de Francio". Ĝi konsistas el ses artikoloj.

Artikolo unua :
La fabrikado kaj la eksportado de armiloj estas malpermesataj sur la vastaĵo de la nacia teritorio. La transito de armiloj estas malpermesata tra Francio.

Artikolo dua :
La uzinoj, la arsenaloj kaj diversaj entreprenoj, kiuj laboras por la armeoj kaj eventuale por la milito estas transformataj por fabriki civilajn produktojn.



N° 271

SÉNAT

SECONDE SESSION ORDINAIRE DE 1992-1993

Rattaché pour ordre au procès-verbal de la séance du 15 avril 1993
Enregistré à la Présidence du Sénat le 22 avril 1993

PROPOSITION DE LOI

relative au **désarmement unilatéral de la France.**

PRESENTÉE

Par MM. Franck SÉRUSCLAT, Germain AUTHIÉ, Mme Maryse BERGÉ-LAVIGNE, MM. Jacques BIALSKI et Marc BŒUF.

Sénateurs

(Renvoyée à la commission des Affaires étrangères, de la défense et des forces armées, sous réserve de la constitution éventuelle d'une commission spéciale dans les conditions prévues par le Règlement.)

Artikolo tria :
Francio permesas ĉiujn internaciajn kontrolojn por konstati la aplikon de ĉi tiu leĝo.

Artikolo kvara :
Francio detruas aŭ progresive transformas la totalon de sia armilaro kaj de sia militmaterialo ; iom post iom ĝi likvidas siajn terarmeon, mararmeon, aerarmeon.

Artikolo kvina :
La franca registaro havas la respondecon de la apliko de tiu leĝo; ĝi prezentas ĉiun kvaran jaron al la Parlamento unu leĝon, kiu indikas, dum tiu periodo, la programojn de malarmado kaj transformado de armilindustrio ĝis la realiĝo de la fiksita celo al la antaŭa artikolo.



Artikolo sesa :
La franca registaro entreprenas federiĝi kun la registaroj, kiuj aplikas similan leĝon.

Malgraŭ ke, en 1993, Prezidanto de la franca Respubliko (S-ro Mit-



terrand), proklamis, ke li estis 'socialista', la franca Parlamento ne debatis la leĝproponon.

Tamen tiu ago de kvin gesenatanoj, oficialigante tiun leĝproponon, kiu




estis registrita sub la numero 271, permesis agnoski ekziston de la movado "por unuflanka malarmigo de Francio". Tiu movado estas tre minoritata en Francio, sed ĝi ekzistas. Oni povas nur bedaŭri ke ĝi ne agis por pligrandigi sian influsferon.
La ĝenerala malarmigo estas bonega afero sed la loĝantoj de poluitaj landoj pro kontraŭpersonaj minoj ne povas atendi la aplikon de la ĝenerala malarmigo, necesas agi antaŭe kaj la elimino de kontraŭpersonaj minoj estas absoluta neceseco, tie eble estas diferenco inter Jakvo kaj mi.
Sed oni povas progresigi la influsferon pri "ĝenerala malarmigo", ekzemple : La SAT-anoj povus adapti la francan leĝproponon al ilia lando kaj skribi al deputitoj por peti debaton en la landa Parlamento, kaj la francaj SAT-anoj povus sendi la leĝproponon n-ro 271. Tiu komuna ago povus okazi dum la lasta semajno de oktobro, kiu estas la internacia semajno de U.N.o por la malarmigo. Kia estas la opinio de la PK. de SAT pri tiu propono ?

André Weiss (35366).

LA HOMOJ, NE LA BESTOJ, FARIS "AUSCHWITZ"

Antaŭ nelonge, la itala televido prezentis la filmon "Oferbuĉo", dum ok vesperoj, kaj la personoj multe parolis pri tio, kun diversaj opinioj kaj konsideroj. La filmo nenion novan diris al mi; nenion, kion mi ne jam sciis. Sed la kortuŝo, la impreso kiun mi sentis ne estis malpli vivaj. Kaj kiam mi iris al la termobanejo de Acquasanta,



en provinco de Ascoli Piceno, kaj mi troviĝis inter viroj kaj virinoj kune atendantaj la kotbanojn, la sulfurbanojn kaj la masaĝojn, kovritaj per banroboj kaj kun viŝilo ĉirkaŭ la kolo, ia naŭzo kaptis min, car la bildoj de la filmo miksiĝas kun tiu ĉi realeco kaj ŝajnas al mi retrovi en la malgranda popolamaso, ĉirkaŭ mi, la personojn kiuj per la falsa preteksto de la duŝo, devis morti en la gaskameroj.

La filmo "Oferbuĉo" aŭ "Oferbruligo", mi ripetas, nenion novan diris al mi, nenion kion mi jam ne sciis. fakte mi vizitis unu el tiuj ekstermejoj, nome Auschwitz-Birkenau (Oswiencim en pola lingvo) kaj mi ne nur vizitis tiun ekstermejon, mi tradukis el Esperanto en la italan lingvon ĝian gvidlibron por la italaj vizitantoj, laŭ la peto de mia pola amikino, jam studentino en la universitato por eksterlandanoj en Perugia. Ŝi diris al mi, ke se mi faros tiun ĉi tradukon por ŝi, ŝi havos gravan avantaĝon por ŝia estonteco. En tiu tempo, en la jaro 1970, mi ne fartis bone, pro tio la traduko pli deprimis min; eble ĝi estigis la malesperon kiu turmentadis min kaj kontraŭ kiu mi reagis per ĉiuj miaj fortoj. Mi devis gutumi la vortojn priskribintajn terurajn okazintaĵojn, por redoni ilin en mian lingvon. Sed mi ne rezignis, ĉar mi volis absolute helpi mian amikinon.

Mi estas kiel hejme en Pollando. Pollando estas mia dua patrujo. Tamen mi multe hezitis antaŭ ol eniri en Auschwitz(n). Mi konsentis paŝi tien nur ĉar grupo de geamikoj volis viziti ĝin; kaj mi, kiu ne sciis ankoraŭ ŝofori, ne emis resti longajn horojn en la aŭtomobilo parkita antaŭ la enirpordo de la koncentrejo, nun Muzeo, por atendi ilian revenon.

Mi metos do miajn du piedojn en Auschwitz malgraŭ mia neŝato, sed mi ne bedaŭras pro tio. Male, mi revizitis la lokon la duan, la trian fojon. Mi komprenas, ke ni ne devas turni la kapon kun preteksto ke la vero malkvietigas nin. Ni devas scii, eĉ se la vero tro pezas, por ke tio ĉi ne reokazu. Sufiĉe granda kvanto da homoj ankoraŭ ne sciis (kaj tio ĉi ne estas justo por tiuj kiuj estis masakritaj) kaj nun ili surpriziĝas, eĉ ne kredas.

Vizitante Auschwitz mi trovis ĉion, kion mi gutumis, vorton post vorto, en la Esperanto-Gvidlibro, kaj ĉion, kion mi vidis en la dokumentoj donitaj al mi de iu pola doktoro, en la jaro 1959, kiam la unuan fojon mi vizitis varsovion, okaze de la 59-a Universala Kongreso de Esperanto. Trairante la kadraron, kie paŝis la malliberuloj



por iri al la laboro, kun supre skribita la mokaĵo: "LA LABORO LIBERIGAS VIN", miaj kruroj ligniĝis kaj mi antaŭeniris peze. Krom tio ĉi mi havis la impreson, ke mi ne estas sola, ke la malliberuloj lacaj senlime svarmas ĉirkaŭ mi, sin apogante unu al la alia por ne riski novan selektadon, kiu kondukos la pli malfortajn al la morto.

Pro la granda silento, eĉ ŝajnis al mi percepti la voĉojn de tiuj malbonŝancaj kreitaĵoj, kiuj kulpis pro nenio, aŭ pri niaj samaj pekoj, tamen tragike apartenantaj al raso, al partio, aŭ al medio, kiujn la barbareco de taĉmento de frenezaj monstroj volis ekstermi. "Kial?", mi demandis min. "Dio, kie vi estis?", mi kriis interne de mi. La samajn demandojn faras la homoj, kiuj vidis la filmon. Tamen "Oferbruligo" montras nur etan parton de tio, kio okazis. Kaj ne Dio, eĉ ne la bestoj, faris la ekstermejon.

Nur la homoj.

La duan fojon, kiam mi vizitis Auschwitz(n), miaj geamikoj sidis ĉe la kafejo situanta apud la enirejo de la Muzeo. Mi volis nenion gustumi. Ne eblas gustumi



ion ajn, por refreŝiĝi aŭ malsoifiĝi post la vizito al loko, kie superregis la krueleco kaj la angoro. Sed mi aĉetis memorigan poŝtmarkon kaj albumon kun fotoj de la ekstermejo. Iama malliberulo, nun vendisto ĉe la butiko de la Muzeo, subskribis tiun albumon.



La originalon de la gvidilo al la Ŝtata Muzeo de Aŭschwitz-Birkenau verkis Kazimiro Smolen. tiu ĉi gvidilo havas en la unua paĝo fragmenton (malfermiĝas per fragmento) de la versoj de malliberulo N. 6524, nome de R. Stakowski, verkitaj en junio 1942:"... la truo de la ĉenoj kaj la voĉo de la malliberejo. Leviĝas el la ombroj la Doloro, La Malespero, la Ribelo kaj la Falo. Mi staras por iri senforta al la ekstrema turmento kun la griza uniformo de la karcero".

La ordono konstrui la ekstermejon de Auschwitz-Birchenau okazis en aprilo 1940. Rudolf Höss estis la ĉefo. La hitleranoj direktis la unuan transportadon de polaj malliberuloj al la "Konzentrazionlager Auschwitz" la 14-an de junio 1940.

Hodiaŭ la dezertaj gardturoj kun siaj mitraliloj ne plu timigas. Oni ne plu aŭdas la krialvokojn de la gardistoj, la bruon de la botoj de la alternantaj sentineloj. Oni ne plu vidas vagadi milionojn da malliberuloj ĉiam pli malgrasaj, kun la striita kaptiteja vestaĵo. Malpleniĝis la barako, kie troviĝis la sidejo de la estro de la kampo kaj la sidejo de la devigaj laboroj, de la cenzuro de leteroj kaj de la kolekto de novaj alvenintoj. Sed pluvivas la betulo, kiu kreskis ĉe la enirejo, kie la kaptitoj haltis surmetante por la lasta fojo siajn vestaĵojn kaj kie ili ankoraŭ havis siajn proprajn nomojn. Antaŭ tiu betulo paŝis dekoj da miloj de viroj kaj virinoj. De tie ili transiris la pikdraton.

Ne ekzistas nur la lokoj de la martiriĝo. Ekzistas ankaŭ la skribitaj atestoj. La kuracisto de SS, Johan Kremer, kiu ĉeestis persone en la selektado, skribis en sia memorkajero:

"Je la tria de la mateno mi partoprenis la unuan fojon en la aktivado. Kompare kun ĝi la infero de Danto estas nur komedio. Vespere, preskaŭ je la 20-a horo, mi parto-



prenis denove en la selektado. La personaro de SS ĉeestis en ĝi, ĉar tiu personaro ricevis unu kvinon de litro de alkoholo, kvin cigaredojn, unu hektogramon de kolbaso kaj unu panegon".


Rudolf Höss skribis ankaŭ ĉi tion :

"Antaŭ la fino de la somero 1942, ni ekcindrigis la kadavrojn sur ligno en brulejo, poste ni elterigis la kadavrojn, kiuj estis en la ŝtonminejoj. Ni surverŝis ilin per brulaĵo. Je la fino de la jaro ni sukcesis malplenigi la grandajn tombojn, kiuj entenis sepcentmil korpojn".

La gaskameroj kaj la kremaciforrnoj venis post la pafadoj kaj la bruligoj sur la amaso de lignaĵoj. La homojn de SS naŭzis la sango, kiu elfluis el la pafadoj antaŭ la muro de la morto, kelkajn paŝojn for de la ĉambreto kie pereis Pastro Maximiliano Kolbe. Tiuj homoj alvokis pli puran sistemon kaj pli rapidan, por ke la stomako ne suferu kaj por ke ili ne laciĝu pro la troa laboro. Pro tio estis akceptita la "Zyklon B".

Pereis pastroj kaj homoj kiuj apartenis al diversaj konfesioj, al diversaj sociaj medioj kaj profesioj. pereis sanuloj kaj malsanuloj, maljunuloj kaj infanoj, intelektaj komunistoj kaj ciganoj, pereis precipe judoj.

Nuntempe estas, kiu kredas kaj konsternite sin demandas pri la kialo de tioma krueleco; kaj estas, kiu ne kredas



kaj konsideras "Oferbruligo"n mensogo de la amerikanoj. Estas malfacile kredi, sed oni ne povas nei veraĵon tiel evidentan. Bedaŭrinde, la ekstermkampoj ekzistis. Mi ekaŭdigis mian voĉon en la Justica Palaco de mia urbo, iun tagon, kiam mi tie troviĝis, al juna advokatino, ĉar ŝi parolis pri dolĉaĉa amerika inventaĵo. Mi laŭtigis mian voĉon por diri, ke Auschwitz(n) mi vidis per miaj propraj okuloj.

En la oficejo de Radio Varsovio, samideano demandis min pri kio mi sentis vidante Auschwitz. Mi diris, interalie, ke la pendigilo terurigas min. Tamen, kiam mi vidas pendigilon flanke de la kremaciejo kaj mi sciis ke per ĝi oni mortigis Höss, mia reago estis ne antaŭvidebla. Mi komencis salti kaj bati la manojn;"la justico estas ankaŭ venĝo", diris doktoro Ettore Toffoletto el Bologna, kiam mi rakontis tion ĉi al li. Höss ploris kaj petegis por la savigo de sia vivo, li, kiu mortigis milojn da homoj!

Estas poezio, kiu resumas la judan tragedion: "Li, judo, fermis la kofron kaj premis niajn manojn. Tro malfrue mi komprenis lian miron ĉe la konstato ke ni, la kristanoj, lasis lin foriri. Li ekmarŝis al Auschwitz por morti tie. Nun niaj gefiloj kreskis. Lia filo volas scii, mia filo ne scios kion respondi. sed vi kaj mi scias, ke ni permesis al li foriri".

Lina Gabrielli

Postkongresaj pripensoj

La debatoj kaj voĉdonoj rilate la deklaracion kaj gvidrezolucion preparitajn de la proponkomisiono estigis al mi kelkajn pripensojn postkongresajn. Efektive mi konstatis ke ni, membroj ĉeestantaj la laborkunsidon, ne havis sufiĉe da tempo por vere pripensi la tekston de la proponkomisiono, ĉar ni ricevis ĝin nur komence de la lasta laborkunsido. Por pli efika pritrakto de tiu punkto de la tagordo oni devus aldoni paragrafon al la kongresa regularo (se ĝi ne jam enestas) en tiu senco: "La proponkomisiono preparas la tekston de deklaracio kaj gvidrezolucio kaj afiŝas ĝin sur informtabulo je la fino de la antaŭlasta laborkunsido."

Se mi bone rememoras la tekston tiam disdonitan (iu ŝtelis mian ekzempleron dum la kunsido!), la punkto pri la "imperiisma milito de Usono en Irako" ne kontentigas min. Kvankam mi konsentas ke tiu milito havis gravajn konsekvencojn tutmonde kaj estas kondamninda, ĝi ne estis la sola konflikto dum la pasinta jaro. Tial mi aprobas la intervenon de k-do Audibert, kiu postulis aldonon "... kaj kondamnas ĉiujn militojn" . Por mi la vorto imperiisma ne necesis en tiu loko, ĉar ĝi troviĝas jam komence de la alineo. Cetere kion signifas imperiisma milito? Ĉu la milito de Putin per la rusa armeo en Ĉeĉenio estas imperiisma? El la vidpunkto de la ĉeĉenoj ĝi probable estas popolliberiga, ĉu ne? Por pacisto ne ekzistas "justa aŭ maljusta aŭ eĉ sankta milito". Milito solvas neniun problemon, male ĝi kreas nur mortojn, detruojn kaj novan maljuston. Ekzistas neperfortaj metodoj de rezistado kaj popolliberigo –bedaŭrinde ne sufiĉe konataj, organizataj kaj trejnataj.

Krome, estante sennacieca asocio ni devus en tiu rilato (se ne farita en alia alineo) kondamni la naciismon, unu de la kaŭzoj por estiĝo de milito dum multaj nuntempaj konfliktoj. Koncerne Usonon kaj ĝian koalicion mi ŝatus aldoni ke multaj usonanoj, britoj kaj alinacianoj – ne nur intelektuloj – kontraŭis la intervenon en Irako kaj avertis pri la negativaj sekvoj. Ili malfidis al siaj respektivaj registaroj Bush kaj Blair, kies mensogoj ĉiam pli kaj pli evidentiĝas.

Fine mi demandas min, ĉu kleriga asocio kiel SAT devas preni politikan pozicion en gvidrezolucio. Se jes, ĝi estu sufiĉe ĝenerala rilate militojn kaj kondamnu ĉiujn militojn. Se mi bone komprenis, iuj komunistoj volas kondamni nur la imperiismajn militojn. Se estas tiel, ili faru tion en aparta gvidrezolucio de la komunista frakcio, sed ne altrudu tiun vidpunkton por la gvidrezolucio de SAT.

Rikardo Schneller

Jam estas aŭgusto kaj multaj el vi ne pagis vian ĉijaran kotizon ! Espereble temas pri nura forgeso. Do bonvolu ripari tiun forgeson, ĉar sen la kotizoj nia Asocio ne povas funkcii. Aktivu, kunlaboru kaj subtenu vian Asocion !

Informo pri la stato de arestitaj el PORTOS

En la Kortumo de la Moskva provinco troviĝas la fabrikita krimafero kontraŭ reprezentantoj de la junulara social organizo PORTOS (Poeziigita Unuiĝo por Prilaboro de la Teorio de Tutpopola Feliĉo) Jurij Davydov kaj Jevgenij Privalov. Ili, kaj ankaŭ jam kondamnitaj al enkarcerigo Irina Derguzova kaj Tatjana Lonakina - poetoj, filozofoj, ĵurnalistoj, esperantistoj, estas akuzataj je kreo de "kontraŭleĝa armita grupo", "organizo de unuiĝo, aganta kontraŭ rajtoj kaj personeco de la civitanoj". Tiuj personoj troviĝas malantaŭ la krado ekde la 7a de decembro 2000, jam pli ol 2,5 jaroj.

Fifama pro siaj falsaj ekspertizoj, psikiatria kliniko je la nomo de Serbskij, nomis Privalov-on kaj Davydov-on "nerespondecaj pri siaj agoj" (ja konstruado de la Feliĉa Socio estas "deliro de rekonstruemo kaj reformemo"), kaj lanĉis por ili apartan proceson. La federa juĝisto Kivanova en sia fina decido la 10-an de junio 2002 trovis materialojn, kolektitajn materialojn por akuzi Davydov-on kaj Privalov-on senpruvaj, kaj revenigis la aferon al la prokurorejo por ke esploristoj aŭ trovu pli konvinkajn pruvojn aŭ liberigu la akuzatojn.

La 16-a de novembro 2002 la Supera kortumo redonis la aferon al la Moskva provinca kortumo, al alia juĝisto.

Dume Derguzova kaj Lomakina estis kondamnitaj al 8 kaj 6 jaroj de prizono respektive. Nun ili batalas por la rajto vivi kaj pensi en la tiel nomata "korekt-labora koncentrejo", kaj kasacio por ilia afero troviĝas en la Supera kortumo.

La 4an de marto estis arestita ankoraŭ unu reprezentanto de la organizo, Aleksej Merkulov, la esplorado daŭras. Pliaj 8 membroj estas anoncitaj por serĉado tra Rusio.

La afero havas specialan socian signifon pro la sekvaj kialoj:

1. La centran parton en la ideologio de PORTOS oni dediĉas al diversflanka edukado de junularo. La agado de la organizo havas evidentan soci-utilan kaj bonfaran karakteron: verkado de poemoj pri la temo "Kion fari por feliĉo de Patrio", propagando kaj studado de la internacia lingvo Esperanto, organizo de eksperimentaj agrikulturaj kaj industriaj entreprenoj por esplori metodojn por plialtigi la laborproduktadon, ekzemplo de la sobra sana vivmaniero (sen drinkado kaj drogoj), kompleksa instruado laŭ cent direktoj de evoluigo de la Personeco, helpo al polico por gardi la ordon sur la stratoj en volontulaj taĉmentoj, teno de la fajnaj rilatoj inter diversaj generacioj estas ĉiamaj direktoj de ties agado.


2. Kiam tiel nomataj "suferintoj" venis al la juĝproceso, ili diris, ke ne konsideras sin suferintoj, ke iliaj antaŭaj atestoj estas fabrikitaj de la policaj esploristoj sub fizika kaj psikologia premo, kaj ke ili volas daŭrigi sian vivon en PORTOS.

3. Kiel atestantoj al la juĝproceso venis reprezentantoj de militveteranaj organizoj, de Movado por Protekto de Infaneco, Gorbaĉov-fondaĵo, gepatroj de la pereinta en la Blanka Domo en oktobro 1993 (dum defendo de la Parlamento kaj Konstitucio) oficiro Gennadij Sergeev, esperantistoj, ĵurnalistoj. ĈIUJ atestantoj parolis defendante la akuzitojn. Malgraŭ tio, "la proceso daŭras".

4. En unu el la lastaj kortumkunsidoj la advokato de PORTOS, Dmitrij Agronovskij estis senkaŭze forigita el la proceso (cele al altrudi "sian" advokaton, anticipe konsentan je ĉiuj malplej bonaj rezultoj), kaj nur la Supera Kortumo revenigis lin en la proceson. La proceso ĉiam prokrastiĝas, kaj la dato de la sekva kunsido estas nur la dua de aŭgusto 2003.

Tiel, evidentas la penoj neniigi la organizon, per kio oni kreas tre danĝeran precedencon, kiu poste povas fariĝi preteksto por pluaj reprezalioj en Rusio de aliaj sendependaj sociaj organizoj.

Membroj de PORTOS
08.07.2003



Jen du legindaj libroj por tiuj ĉi varmaj someraj feriaj tagoj! Mendu tiujn SAT-eldonaĵojn ĉu al via kutima libroservo aŭ al la SAT-sidejo.

Prezoj:
La Universalismo : 12 € inkl.afr.
Vualo de l'silento : 12 € inkl.afr.





76-a SAT-KONGRESO

ĈAŬDEFONO

12-19 Julio 2003

OKK : David Buhlmann (30984), Francisko Degoul (32785), Perla Martinelli (35546), Dieter Rooke (35571), Giorgio Silfer. Ekstera pri librotenado : Sonja Brun.

Adreso : 76-a SAT-Kongreso, ĉe KCE, cp 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, (Svislando). Rete: <esperanto.kce@esperantio.net>
Tel/fakso : +41.32.9267407.

DETALAJ INFORMOJ PRI LA SUKCESA KONGRESO APEROS EN SEPTEMBRA KAJ OKTOBRA NUMEROJ DE SENNACIULO!

DEKLARACIO

La 76-a Kongreso de SAT okazanta en La Chaux-de-Fonds (Ĉaŭdefono) de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2003 kun 155 partoprenantoj el 28 landoj:


- **kondamnas** vizoreĝimojn kaj aliajn leĝajn regulojn kiuj atencas la rajton de homoj je libera cirkulado sur la tuta Tero kaj invitas koncernajn ŝtatojn ŝanĝi ilin.
- **Reasertas** la firman opozicion de SAT kontraŭ la imperiisma milito en Irako plenumita de la internacia alianco gvidata de Usono, kaj kontraŭ ĉiuj imperiismaj militoj.
- **Alvokas** ĉiujn esperantistojn, kiuj povos, partopreni en la venonta Eŭropa Socia Forumo, kontribui al ties politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj celoj kaj malfermi ĉiuflankan debaton pri lingva politiko.
- **Subtenas** la sintenon kaj agadon de la Ekologiisma Frakcio de SAT rilate la principojn de mediprotektado anoncitajn en ĝia Deklaracio de 2003-07-14.

GVIDREZOLUCIO

La 76-a Kongreso de SAT okazanta en La Chaux-de-Fonds (Ĉaŭdefono) de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2003:

- **salutas** la naskiĝon de la nova hispanlingva LEA – SATEH;
- **Instigas** la membrojn partopreni en la agado de la Eŭropa Socia Forumo kaj de la Monda Socia Forumo por helpi al la realigo de iliaj celoj : per tradukado de TTT-paĝoj de SAT kaj de tekstoj de ESF, kiel ankaŭ per informado per niaj TTT-paĝoj kaj en *Sennaciulo* antaŭ la ESF; per interpretado, helpo ĉe budoj, disdonado de flugfolioj, loĝigado de aliurbanoj, ĉeesto en Forumaj diskutoj, kaj partopreno en eventuala seminario aŭ fakkunveno.
- **Proponas** ke en *Sennaciulo* kaj en la venonta SAT-kongreso estiĝu debato pri la lingvopolitiko.
- **Alvokas** la membraron helpi plibonigi kvante kaj kvalite la nacilingvan informaron en niaj TTT-paĝoj, cele al starigo de senperaj rilatoj inter la SAT-medio kaj progresemuloj, kiuj informiĝas pri Esperanto kaj eklernas ĝin.

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.
Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,64 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7,29 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 10,40 € (reg. afranko).
la menditajn librojn.

HELPO AL LA ASOCIO
En Japanio (JPY) Yasuo MORITA 86000,00 ; SAT-Japanio
En Francio (€) Signoret 100,00
En Nederlando (€) Post malfondiĝo de Haga SAT-rondo 275,00 ;

POR LA NOVA KOMPUTILO
Lilio Grandière 200,00 €; Ge-Duc- Goninaz 100 €; J.W. Moonen 100,00 €; R. Lynn 20 CHF

NOVALIĜOJ
35.623 Petik Janos, Szontagh Pal ut. 9, Fsz.7, HU-2260 Balasagyarmat, Hungario
35.624 Sugiyama Sigeki, Yokoi 2-22-7, JP-427-0024 Simada, Japanio.
35.625 *Kawai Yuka, Higasi-5, Minami-5, 2-21, JP-072-0016 Bibai, Japanio
35.626 Desailly Paul, Oriental University City, Apart. 301, Unit 2, Building 16, CN-065001 Langfang, Hebei Province, Ĉinio
35.627 *Desailly Velanta, Oriental University City, Apart. 301, Unit 2, Building 16, CN-065001 Langfang, Hebei Province, Ĉinio
35.628 *Hirai Isako, seiiku 4-17-15, Zyoto-ku, JP-536-0007 Oosaka, Japanio
35.629 Schneider Jean-Pierre, estrancrose Route des carrières, Fr-13570 Barbentane, Francio
35.630 Leroy Dominique, Avenue Maréchal Juin, Morvan B 514, FR-76420 Bihorel, Francio
35.631 *Itagaki Akiko, Kongosawa 3-9-48, Taihaku-ku, JP-982-0803 Sendai, Japanio

REALIĜIS
33.316 *Poux Jacqueline, 38 rue de l'Eglise, FR-25720 Avanne, Francio

NEKROLOGO

La 18.5.2003- mortis pro pankreata kancero, 88-jara en Uzi (JP) nia kamarado

NAKAMURA Hideo
(matr. 33.048)
Ankaŭ lia pli aĝa frato Nakamura Pakuzo estis SAT-ano. Lia patro Nakamura Yuraku estis unu el pioniroj de japanaj esperantistoj. K-do Nakamura Hideo longe gvidis esperantistan pacistan grupon Rondo Ken. Fine de marto li skribis en la bulteno de Rondo Ken sian lastan artikolon, kiu alvokas kontraŭstari la usonan atakon al Irako.

*****

La 2-an de majo, en la aĝo de 92-jaroj, mortis en Hukuoka (JP) nia malnova kaj fidela membro,


k-do SATO Etuzo
(matr. 31.319)
Li esperantistiĝis en 1929 en Koreio. Post la mondmilito li aktivis en Hukuoka. Ni kondolencas la familianojn kaj geamikojn.

*****

En Labastide-R (FR) mortis nia malnova membro, k-dino

Suzanne CALAS
(matr. 32676)
Ŝi estis dum jaroj respondeculino de Liberpensula Frakcio de SAT, kaj ŝi estis kremaciita la 8-an de julio.
Ni kondolencas al familianoj.

22377Y




Arestita en groteske skandalaj kondiĉoj lunde la 23an de junio 2003, José Bové (ĵoze bove) de tiam sidas en karcero pro sia sindikata aktiveco, en Villeneuve-les-Maguelone (vilnevlemaglon), en la «Lando de la Homaj Rajtoj». Li loĝas en la teretaĝo, Bloko A, Domo A, ĉelo 07. Lia karcerana numero estas 22377Y. Jam de lia enkarceriĝo, letero de lia kunulino, Ghislaine Ricez (gilen rise) estas ĉiutage publikigata en la gazeto «l'Humanité». Ĉi sube mi tradukis la leteron publikigitan la mardon 1an de Julio.

"Ni ĝeneraligu niajn batalojn"

Jam de ok tagoj José estas en karcero. La mobilizo ne malfortiĝas. Ne, li ne estas sola. La informbultenoj atestas pri tio: la nacia edukado bolas, la terkulturistoj koleras pri la «nova» PAC (Komuna Agrikultura Politiko), la intermitaj dungitoj de la spektaklaj servoj batalas, ktp. Oni provas kolbase dispecigi nin, enŝlosi nin en «kategoriajn postulojn», sed ŝajnas al mi kontraŭe, ke la komunaj punktoj estas okulfrapaj. Kulturo, edukado aŭ terkulturo: ĉie estas malestimo pri la homoj, la registaro estas surda, la politiko estas miopa kaj la celaĵoj estas strikte financaj. La socio estas sub la premo de la mono.

Kiel aŭdatigi sin? Kiel montri, ke ni ĉiuj estas kune sur la sama ĉeno kaj ĉiuj ĉeneroj interteniĝas? Oni ofte riproĉis al José, la kamparano, ke li entrudas sin en la aferojn de la mondo. Mi ankoraŭ aŭdas lin diri: «Ni ĝeneraligu niajn batalojn kaj ni ĝeneraligos la esperon.» Jes, la kamparano povas paroli kaj agi kune kun la intermita dungito de la spektakloservo kaj la instruisto. Ĉar ili bezonas kune konduki komunan batalon kontraŭ la saman politikon.

La regopovo ja provas «dronigi la fiŝon» (= konfuzi la problemon) per abunda uzo de komunikrimedoj. Oni neniam parolas pri la fundo de tiuj reformoj, pri iliaj konkretaj konsekvencoj por la homoj. Hieraŭ, la fervojistoj estas akuzitaj, ke ili «ostaĝigas» (=garantie prenas) la uzantojn. Hodiaŭ jen estas la vico de la intermitaj dungitoj: oni fingromontras ilin, ĉar ili «ostaĝigas» la spektantojn! Mi rimarkas, ke tiujn oni silentigas, sankcias, eĉ enkarcerigas, kiuj volas plivastigi la debaton, plivastigi



la batalojn. La registaro evidente timas la konverĝon de tiuj diversaj sociaj movadoj. Pruvo pri tio estas, ke post la alvoko (1) farita de la Kamparana konfederacio kaj diversaj movadoj, la ministroj nuligas unu post la alia siajn provincajn vizitojn, timante, ke ili devos klarigi sian pozicion antaŭ manifestaciantoj. Ĉu oni ne nomas tion «la timo»?»

(1) Alvoko perturbi la vojaĝojn de la ministroj, kien ajn ili iros, dum José Bové restos en karcero, al kiu li estas kondamnita por dek monatoj.

Petro (23.111)

KUNLABORU EN SENNACIULO ! NI BEZONAS ARTIKOLOJN EL LA TUTA MONDO POR INFORMIĜI KAJ INFORMI LA ALIAJN !

VIA REDAKTORO APARTE ŜATUS HAVI ARTIKOLOJN EL ALIAJ KONTINENTOJ, AZIO, AFRIKO, AMERIKOJ KAJ AŬSTRALIO !

NI MONTRU KE NI ESTAS TUTMONDA ASOCIO !

S.A.T.  ERINACO

REZISTANTO





PRAVDA

Nikson kaj Breĵnjev konkuras bicikle kaj Nikson gajnas. Morgaŭon "Pravda" per grandaj literoj informas: "Nia kamarado Breĵnjev estis brile dua kaj Nikson antaŭlasta".

EKSPOZICIO

Tony Blair, Vladimir Putin kaj Jacques Chirac kune rigardas pentraĵon kiu prezentas la unuajn homojn, Adam kaj Eva.

Blair: "Rigardu kiel ili estas trankvilaj kaj seriozaj. Ili devis esti angloj.

Chirac: "Ne, vidu, kiel ili estas belaj kaj senhontaj, tiel nudaj. Laŭ mi ili devis esti francoj.

Putin : "Sed tute ne, rigardu bone! Ili ne havas vestaĵojn, havas nur pomon por manĝi kaj oni diras al ili ke tio estas Edeno (paradizo). Ili certe estis rusoj.

ĈU NE KONATA ?



Kvankam ni pensis ke nia asocio ne estas sufiĉe konata, jen la kontraŭa pruvo.

Oni povas trovi nin ĉie.

Ĉi apude sur iu-parkejo!